

SCIENCA REVUO de Internacia Scienca Asocio Esperantista (BEOGRAD, Jugoslavio)	El Vol 21 n-ro 4/5 (84/85) 5. 9. 1970.
---	--

ESPERANTA PRONONCO

Prof. John Adcock (Wellington, Nov—Zelando)

Zamenhof donis definitivan formon al la gramatiko kaj vortmateriale de la lingvo, sed rilate la prononcon li povis doni nur ĝeneralan gvidon, ĉar mankis al li la moderna fonetika scienco. Sekve ne estas firma klasika normo kaj plejparte oni akceptas la modon.

Tia agado povas alporti danĝeron. La modo ĉiam ŝanĝiĝas kaj ni ne deziras ŝanĝon kiu ne estas plibonigo. Ŝanĝo en si mem minacas nian lingvon kiel la samideanoj bone komprenas kaj la fakto, ke oni kontraŭstaris facilajn ŝanĝojn, kontribuis multe al la nuntempa sukceso de la lingvo. Sed tio estis ebla ĉar la Zamenhofa fundamento estis klara antaŭ ni. Pri la prononco ne estas tiel facila.

Tre saĝe Zamenhof elektis uzi nur kvin vokalojn kaj decidis ke la »meza« formo estas dezirinda. Bedaŭrinde la meza formo, kiam oni temas pri kyalito kaj ne pri longeco, estas sufiĉe malofta inter la lingvoj de la mondo kaj do estas malfacile por havi definitivan normon, kaj plejparte Esperantistoj emas uzi ian nacian formon.

Rilate la vokalojn kiuj kutime varias ĉefe laŭ longeco (ikaj u) ne estas grava problemo. La du ekstremaj formoj estas sufiĉe klaraj al lernantoj kaj oni povas konsili uzon de la mallonga formo. En la praktiko oni kutime trovas ke por la akcent itaj silaboj la longa formo okazas kaj por neakcentitaj silaboj, aŭ en la tielnomitaj »fermitaj« silaboj (silaboj kiuj komencas kaj finas per konsonanto kaj sekvitaj de silabo ankaŭ komencantaj per konsonanto) la sono estas mallonga. Tamen normo estas la meza formo kaj oni provas prononci tiel. Ne estas dezirinde konscie mallongigi la vokalojn, ĉar

tiel okazas nature kaj la sola kailo por akcepti tian prononcon estas ke oni ne povas facile eviti ĝin dum ordinara, rapida konversacio.

Pri la aliaj tri vokaloj la problemo estas pli grava. La litero e havas du formojn krom konsidero de longeco. La diferenco estas plejparte laŭ la distanco inter la supra parto de la lango kaj la palato. Kiam ĉi tiu distanco estas malgranda, la sono similas al tiu de la litero i, kaj kiam granda — estas pli proksima al tiu de la litero a. Ĉu estas dezirinde kapti la mezan formon inter ili? Estas dube ĉar tiam ni havus novan vokalon anstataŭ simple pli longan aŭ pli mallongan formon de vaste uzata formo.

Granda merito de nia lingvo estas, ke oni ne bezonas lerni multajn regulojn sed povas apogi sin sur logiko. Neniu alia lingvo estas tiel konsekvenca laŭ strukturo. Kiam ni devas fari elekton inter du lingvaj formoj, ni nepre agu laŭ la logiko. Do pri prononco ni demandu nin ne pri la nuntempa modo aŭ kutimo, sed pri la principoj kiuj plej bone akordas kun la spirito kaj ĝenerala strukturo de la lingvo. Tiurilate mi sugestas kelkajn kriteriojn por gvidi la elekton de prononco-maniero:

- (1) Maksimigu la diferencon inter similaj vokaloj kaj tiel evitu konfuzon ĉe kiam oni malbone prononcas.
- (2) La elektita formo estu trovebla sufiĉe vaste en la naturaj lingvoj de la mondo kaj ne estu malfacile prononcebla por iu popolo.
- (3) Evitu formojn kiuj facile emas al misprononco, speciale emo uzi diftongojn anstataŭ puraj vokaloj. Kaj logiko kaj la Zamenhofa konsilo postulas, ke ni uzu diftongojn nur kiam la literumo klare indikas. Du apudaj vokaloj ne indikas diftongon kiel ofte okazas en naciaj lingvoj. Por havi diftongon oni devas uzi vokalon kun konsonanto. La konsonantoj **j** kaj **ŭ** havas vokalan funkcion kiam apud vokalo, sed ne povas esti la bazo por aparta silabo. Multaj Esperantistoj eraras tiurilate pri la prononco de **tĵ** kiu devas esti unu silabo, ne du (tu-i).

- (4) La vokaloj havu reprezenton inter la simboloj de la internacia fonetiko.

El fonetika starpunkto ni notu, ke oni akceptas ok fundamentajn vokalojn. Ili estas kutime aranĝitaj laŭ du pozicioj de la levita lango kaj kvar gradoj de leviĝo kiaj estas kutime reprezentitaj en diagramo kiel malsupre:

La ok fundamentaj vokaloj.

i	malvasta	u
e	duonmalvasta	o
ɛ	duonvasta	ɔ
ɑ	vasta.	ɑ

antaŭa →

← malantaŭa

Ni observu, ke ĉi tie troviĝas unu formo de **i** kaj de **u** sed po du formoj de **e** (e kaj e), de **o** (o kaj o) kaj de **a** (a kaj a). Por **i** kaj **u** estas logike elekti la fundamentajn vokalojn. Efektive ili korespondas en la longa formo (**i:** kaj **u:**) al la akcentitaj formoj de la Zamenhofa prononco kaj tiu ĉi fakto estas bona argumento por serĉi prononcon de la aliaj vokaloj inter la fundamentaj fonetikaj vokaloj.

Inter e kaj e ni povas favori la duan, ĉar ĝistaras pli malproksime de **i** kaj **u** oni ne bezonas uzi a, do povas eviti konfuzon tiurilate.

Inter a kaj a la elekto estas simpla ĉar a estas la Zamenhofa sono por la vokalo kaj vaste uzita per Esperantistoj por la akcentita formo de la vokalo. Por la neakcentita formo de la vokalo oni povas simple mallongigi la longanformon kiel por **i** kaj **u**.

Rilate la malfortajn formojn de la vokaloj ĝenerale estas konsilinde ne postuli apartajn normojn, sed simple instrui, ke kiam vokalo estas malforte akcentita ĝi nature perdas kaj laŭtecon kaj longecon sed oni ne bezonas konscie celi tian efikon. Kontraŭe, oni devas klopodi ke la sono restu sufiĉe aŭdebla kaj klara, ke la esenca kvalito ŝanĝiĝu kiel eble plej malmulte. La prononcaj normoj apartenas al la fortaj formoj kaj dum zorgema prononco kiel en deklamo de poemo nenie devas esti dubo pri la vokala kvalito.

Inter o kaj o ni ne povas decidi laŭ la maksimuma aparteca kriterio, sed nia tria kriterio estas grava. Multaj britoj ankoraŭ misprononcas ĉi tiun vokalon, ĉar la malnovaj lernolibroj konsilis la longan sonon kiu por la sudaj britoj estas efektive la diftongo oŭ. Bedaŭrinde, la du lastaj lernolibroj faras rekomendon kiu povus konduki multajn britojn al simila eraro.

En angla prononco la vokalo, kiun oni skribas o laŭ la fonetika alfabeto, okazas preskaŭ ĉiam kiel diftongo oŭ (kiel en »go«) kaj la malforta formo estas kutime o (kiel en »not«). Pro tiu fakto estas tre erarige konsili britojn uzi la o:-sonon, ĉar ili preskaŭ certe falos en la eraron uzi la kutiman diftongon. Sed se oni konsilas la uzon de o: por la forta vokalo, la malforta iĝas tute nature o. Cetere la o:- sono estas sufiĉe ofta en la angla lingvo kaj oni povas facile klarigi ĝin.

Ĉu tiaj rekomendoj estas akcepteblaj laŭ la opinioj de konataj esperantistoj? Kiel ni jam rimarkis, pri la vokaloj **a**, **i**, kaj **u** estas sufiĉa interkonsento pri la prononco kaj la grava problemo estas pri **e** kaj **o**. Zamenhof konsilis nek vastan nek malvastan sed mezan. Bedaŭrinde tia prononco preskaŭ nenie okazas en la naturaj lingvoj kaj en la praktiko oni emas al unu de naciaj formoj. Laŭ raportoj Zamenhof mem uzis vastan prononcon, sed la detala konsilo kiun li donis estis iom konfuziga. En la kvinliigva **Fundamento de Esperanto** la franca kaj angla partoj konsilas la malvastan **e**, dum la rusa kaj pola partoj konsilas la vastan formon. Pri la litero **o** la franca parto favoras longan malvastan formon, la angla konsilas mallongan malvastan, dum la pola kaj rusa partoj denove favoras la vastan formon. Tia konfuzo

estas bedaŭrinda, sed pro la devno de Zamenhof ni povas konkludi ke la rusa/pola konsilo estas la plej bona indiko de la propra celo. Tiel opinias F. Faulhaber en sia tre interesa artikolo en »Esperanta Mosaiko«.

Kalocsay kaj Waringhien en sia **Plena Gramatiko** raportas pri la reguloj de Ĉefeĉ kaj de Wüster. Tiujn regulojn ili pligrandigas ĝis kvar! Ni devas kontraŭstari tian nenecesan komplikigon de nia lingvo. Ĉu ni devas senreziste akcepti la neplanitajn rezultojn de senkonscia agado? Jen la vojo al la kaoso de la naturaj lingvoj. Zamenhof konsilis unu solan normon por ĉiu vokalo, sed permesis sufiĉan grandan variadon ambaŭflanken, tiel ke la fakto ke ne ĉiu nacio tutsimile parolas ne gravas por la kompreno. Ni celu al la normo, sed ne malesperu kiam ni ne precize kaptas ĝin. Sed ja estu nur unu normo po vokalo. Por e kaj o tiu normo prefere estas la vasta formo kiu taŭge lokiĝas en la fonetika skemo kaj similas al Zamenhofa parolo. La prononco povas esti iomete pli mallonga en fermitaj kaj neakcentitaj silaboj, tamen tio estu rezulto de la naturaj emoj sed ne konscie celita. Do ni ne precize difinu tiajn formojn, sed simple akceptu ilin kiel natura vario de la normo de la klare parolata sono kiu ĉiam restu kiel la sola normo.

Notoj de la Redakcio

Konekse kun la tezoj de la aŭtoro J. Adcock estus utile rememorigi ankaŭ pri la klarigoj, donitaj sisteme de Zamenhof mem en la Unua UK (laŭ raporto pri la Kongreso, publikigita en LINGVO INTERNACIA de 15. VII. 1905, N-ro 16, represita en la kolekto »Zamenhof en sia tempo« — Esperantaj Francaj Eldonoj, Marmande, Francio).

Valorajn klarigojn oni povas trovi ankaŭ en la artikolo de Petro Stojan »Enkonduko al la Fonetiko« — en ESPERANTO (UEA), XXII, 1926, N-roj 2, 3, 5, 8/9. P. Stojan difinas la sonadon de la Esperantaj vokaloj per komparo kun la elparolo de adekvataj vokaloj en tipe elektitaj vortoj el kelkaj ĉefaj eŭropaj lingvoj.

En speciala lumo la demando pri la Esperantaj fonemoj estas traktata de prof. D-ro St. Guĝev en lia prejogo »Muziko de la Lingvo«, parton de kiu la legantoj trovos en la nuna n-ro.

Rilate de demando pri longeco kaj mallongeco de la vokaloj en Esperanto, en »Bulgara Esperantisto«, 1969, N-ro 3/4 A. D. Atanasov esprimas sekvan opinion: »Iuj aŭtoroj de gramatikoj aŭ de prilingvaj studoj havas inklinon starigi regulojn pri okazoj, kiam oni eiparolu vokalon pli longe. Tiaj reguloj, laŭ mi, ne estas necesaj. Se pro fiziologiaj kaŭzoj aŭ pro bezonoj de intonacio iuj fonemgrupoj trudas plilongigon de vokaleparolo, tio okazas nature, spontane, sen intenco — kaj sen skvado de ia preskribo. Montrado de la okazoj, kiam aperas tia longigo, povus havi nur konstan kaj klarigan, ne tamen preskriban karakteron.«